



# Norvega Esperantisto

ESPERANTOBLADET

N-ro 5-6  
1969

**ORGANO DE NORVEGA ESPERANTISTA LIGO**  
ĈEFREDAKTORO: JOHAN HAMMOND ROSBACH

3-periodo  
35-a (40-a) jaro  
Monata



## Omăge al la bona Koro

Silenta procesi'  
alvenas dum batalo  
kun preĝ' al nia Di'.  
Sub kruco al vundita hom'  
salutas ĝi post falo  
de paca, hejmo dom'.

Ne nur ĉe sanga vund'  
kaj en batal' ĝi estas,  
sed en la kora fund'.  
La amo de la tuta ter'  
en ĝi ĉiame restas  
por helpi dum sufer'.

Ĝi estas la labor'  
en paco kaj silento  
dum murdoj kaj dolor';  
ĝi estas homoj sub la prem'  
de manko kaj turmento  
kun muta preĝa ĝem'.

Ĝi estas la lament'  
pro vundo aŭ malsano,  
la kristaneca sent',  
la pala voko el karcero,  
la plendoj de infano,  
la lasta lum' d' esper'.

La ĉielarka pont'  
en fido al Jesuo  
el tiu monda hont':  
ke fine venos al sukces'  
kaj venkos al detruo  
la am' laŭ la promes'.

(Laŭ «For de sårede» de  
Bjørnstjerne Bjørnson)



## Sciigoj de N. E. L.

*Aŭtuna agado.* Kiel montras la jarraporto de N.E.L., ankaŭ en 1968 la membronombro iom malkreskis, ĉar okazis tro malmultaj kaj tro malgrandaj kursoj por kompensi la naturan perdon. Sekve la kotizenspezoj ne plu sufiĉas por daŭrigi nian laboron, kaj la kalkuloj montras deficion. Tial la Liga Estraro devis proponi al la landa kunveno plialtigi la kotizojn. Ni proponis relative modestan plialtigon, sed baldaŭ devos proponi plian plialtigon, se la situacio ne ŝanĝiĝos. Kaj nur la kluboj kaj la rektaj membroj povas alporti tian ŝanĝon. La Liga Estraro tial insiste admonas al ĉiuj klubaj estraroj tuj kunveni por plani aranĝon de kursoj dum la venonta aŭtuno. Per bone planita laboro oni povas kolekti interesiĝantojn por kursoj. Sed necesas plani la kursagadon en bona tempo. *Do, ekagu jam nun!* N.E.L. estas preta helpi per kursmaterialoj kaj konsiloj. Ŝtatan subvencion por la salajro de la kursgvidanto oni povas ricevi. Kie neniu loka samideano povas gvidi kurson, oni klopodu fondi studrondon por komencantoj per la koresponda kurso. Petu pri nia studplano. Krome oni klopodu igi lokan gazeton publikigi la gazetkurson (skribu al N.E.L. pri plano kaj provleciono). Sed komencu jam nun prepari la aŭtunajn kursojn! — N.E.L. havas ankaŭ pli ol 100 rektajn membrojn. Certe ankaŭ multaj el ili povos starigi kurson aŭ studrondon. Ni tial direktas ĉi tiun alvokon ankaŭ al ili. Ni petas ĉiun rektan membron, kiu estas preta fari klopodon en tiu direkto, skribi al N.E.L., kaj ni plezure helpos ilin. Post kurso aŭ studrondo oni povos fondi Esperanto-klubon en la loko, kaj estas tre dezirinde fondi klubojn en multaj novaj lokoj.

*Taskotabelo por kluboj.* — *Junio:* La estraro planas la aŭtunan laboron kaj precipe decidas detalojn rilate la aŭtunajn kursojn.

*Julio:* Antaŭ la 15a la sekretario sendas al N.E.L. (kun kopio al la distrikto) raporton pri la 2a jarkvarono kun studraporto pri la 1-a jarduono dorsflanke (blankedo A 10/E 1).

*Aŭgusto:* Estrarkunveno planas la kunvenojn de la venonta monato. La estraro zorgas pri kursejo kaj kurspropagandiloj.

*Septembro:* La kursoj komenciĝas. La studgvidanto refunkciigas la studrondojn kaj fondas novajn. Estrarkunveno planas la kunvenojn de la venonta monato.

*La Liga Estraro.*

## Norvega Esperantisto

ESPERANTOBLADET

*Redakcio:* Johan Hammond Rosbach,  
Hans Amund Rosbach.

*Adreso de la redakcio:* Hulderveien 17 B,  
N-1700 Sarpsborg. — (Limdato por  
manuskriptoj: la 20 en la monato  
antaŭ la apero.

*Abonprezo:* En Norvegujo kaj ekster-  
lando: n. kr. 8,—.

*Anoncprezoj:* 1/1 paĝo kr. 150,—,  
1/2 p. kr. 75,—, 1/4 p. kr. 38,—,  
1/8 p. kr. 19,—.

### Biblioteko

La jarlibro de UEA enhavas multajn informojn, i. a. pri la Esperantaj Bibliotekoj. Kaj tio okazas sub la indiko: «Ni publikigas nur la adresojn de la pli grandaj kolektoj.» Kaj vere ekzistas grandaj Esperantaj Bibliotekoj. La Internacia Esperanto-Muzeo en Wien havas 14 000 volumojn, la Nacia Biblioteko en Sofio havas 11 500 librojn plus gazetaro. Kaj tiel oni trovas nomojn kaj adresojn de multaj bibliotekoj en multaj landoj. Norvegujo ne troviĝas inter la landoj. Ni ja scias la kaŭzon: La libroj de la biblioteko de NEL troviĝas forpakitaj, neregistrataj. NEL havas nek monon nek personaron por la biblioteka laboro. Kaj tio estas domaĝe.

Kaj tio estas domaĝe, des pli, ĉar la adresoj «de la pli grandaj kolektoj» en la jarlibro de UEA

ankaŭ ampleksas la Bengalan Esperanto-Instituton, kiu havas 500 vol. plus gazetoj, kaj la Biblioteka Comunale Ricottiana en Voghera en Italujo kun 300 vol. plus revuoj. Same la Gelderse Bibliotheek en Arnhem, Nederlando, havas 500 volumojn kaj la Esperanto-Domo en Washington D.C., Usono «pli ol 500 vol.»

Kun ioma kuriozemo mi ek-kalkulis miajn proprajn esperanto-librojn. Mi ja ne sciis kie registri limon inter volumo kaj broŝuro, sed tion faris iom hazarde. Kaj vere, mia privata kolekto povus esti registrita inter la pli grandaj! Mi kalkulis 298 volumojn, krome pli ol 200 jarkolektojn de diversaj revuoj kaj pli ol 100 malgrandajn kajerojn, politikajn, religiajn ktp.

Mi ne mencias tion por fieri. Tutcerte multaj esperantistoj en Norvegujo havas same multajn aŭ pli multajn esperantolibrojn. Kaj mi do diras tion kun du celoj:

1. Estas nebona reklamo por nia movado, ke tiaj kolektoj estu menciitaj inter «la pli grandaj».

2. Estas vere domaĝo, ke ni en NEL ankoraŭ ne trovis eblecon registri kaj ekuzi nian bibliotekon, kiu tutcerte estas pli granda ol tiuj. Kie estas la persono, kiu povus transpreni la taskon?

*Haro.*

\*

## Instruista Ekzameno

Kiel pli frue informita, unu kandidato sin anoncis por la instruista ekzameno kaj sukcese trapasis ĝin.

Laŭ decido en la estraro, Norvega Esperantisto publikigas la taskojn, sed pro miskompreno tio ne okazis antaŭe. La programo de la instruista eksamenado konsistas el tri partoj, I: skriba, II: buŝa kaj III: praktika. Jen la skriba kaj praktika programoj (la buŝa ne raportita).

I. Skriba parto.

Ia. Traktaĵo en Esperanto. La temo prenita el la Esperantomovado.

Ib. Korektado de eraroj en teksto, kiu enhavas gramatikajn malĝustaĵojn.

Ic. Tradukdiktaĵo. La eksamenanto diktas en norvega lingvo mallongan tekston, kiun la kandidato rekte skribas en Esperanto.

III. Praktika parto (Okazas preferi en kurso aŭ kluba kunveno).

IIIa. Leciono prova pri donita temo el komenca kurso.

IIIb. Leciono prova pri donita temo el daŭriga kurso.

Jen la taskoj:

Ia.:

Kandidaten besvarer efter valg én av de to nedenfor oppførte stiloppgaver:

1. Kiajn malfacilaĵojn oni devas venki por enkonduki Esperanton en komercon kaj industrion.

2. En kiaj formoj manifestiĝas lingva diskriminacio en la hodiaŭa mondo, kaj kiel Esperanto povas kontribui al ĝia forigo.

Ib. Korektaĵo.

Et år blev det til høyere eksamen gitt følgende oppgave:

### HOLBERG OG STUDENTEN

En svensk student gjorde omkring midten av det attende århundrede en reise gjennom Danmark. Da han kom til København, vilde han gjerne bli kjent med den berømte forfatter Holberg, som hadde skrevet så mange velkjente *lystspill* (1). Han gikk derfor til forfatterens bolig og lot seg melde hos ham. Men Holberg hadde ikke lyst til å la seg forstyrre i arbeidet sitt av en fremmed student. Tjeneren gikk derfor tilbake og sa at hans herre ikke var hjemme. Ergerlig gikk studenten bort.

Den neste formiddag gjentok studenten besøket sitt, men blev avvist av tjeneren med det samme svaret som den første dagen. Da han forlot huset, vilde forfatteren allikevel se den unge studenten som så gjerne vilde tale med ham, og kikket derfor gjennom gardinene i sitt arbeidsværelse ned på gaten. I det samme øyeblikk kom studenten forbi huset og så opp mot vinduet. Mellem gardinene fikk han øye på Holbergs hode, som han straks kjente igjen. Han vendte da tilbake og sa til tjeneren: «Når Holberg neste gang går ut, må De minne ham på at

han ikke skal glemme å ta med hodet sitt.»

Forfatteren likte denne bemerkningen. Han lot tjeneren be studenten komme inn, og han var senere ofte en kjær gjest i forfatterens hus.

(1) Lystspill = komedio.

En kandidat besvare oppgaven som gjengitt nedenfor. Rett denne besvarelsen.

### HOLBERG KAJ LA STUDENTO

Sveda studento faris ĉirkaŭ la duonon de la dekokan jarcenton vojaĝon tra Danujo. Kiam li venis al Kopenhago, li desiris konatiĝi kun la fama verkisto Holberg, kiu skribis tiujn multe da konatajn komediojn. Por kial li iris al la domo de la verkisto kaj lasis sin anonci al li. Sed Holberg ne devis lasi sin disturbi en sia laboro de la fremda studento. La servisto iris ree kaj diris ke lia sinjoro ne estis hejme. Ĉagrenite la studento iris for.

La proksima antautagmeze la studento ripetis sian viziton, sed la servisto forsendis lin per la sama respondo kiel la unuan tagon. Kiam li forlasis la domon, la verkisto tamen volis vidi la junan studenton, kiu tiom deziris paroli kun li, kaj por tial rigardetis tra la kurtenojn en sia laborĉambro sur la straton. En la sama momento la studento pasis la domon kaj rigardis al la fenestroj. Inter la kurtenoj li ekvidis la kapon de Holberg, kiun li tuj rekonis. Li tial reiris kaj diris al la servisto: «Kiam Hol-

berg la venonta fojo eliros, vi devas memori lin ke li devas ne forgesi kunporti sian kapon.»

La verkisto ŝatis tiun rimarkon. Li demandis al la servisto peti la studenton eniri, kaj poste li ofte estis karan geston en la domo de la verkisto.

Ic.

*Esperantodikteren Julio Baghy.*

Julio Baghy, en av esperantobevegelsens mest kjente forfattere og diktere, døde 76 år gammel i 1967.

Han er en av dem som mest har bidratt til at Esperanto har en original litteratur av varig verdi. Selv skrev og talte han Esperanto fra han var 20 år. Julio Baghys dikt, romaner og noveller skaffet ham stor popularitet blant esperantister i alle land. Flere av hans verker er også kommet ut i oversettelser til andre språk.

I mellomkrigstiden ledet han kurser i det internasjonale språket og skrev lærebøker i Esperanto for ungarere.

Under esperantokongressen for to år siden i Budapest fikk han en stormende hyllest fra kongressdeltakerne på de møter hvor han var tilstede.

Hans siste diktsamling, «Cielarko», ble utgitt noen uker før han døde.

III. Instrua provo, elementa kurso.

Første undervisningstime av et begynnerkursus. (Kandidaten velger selv hvilken metode han vil benytte, Cseh-metoden, lærebok, o.s.v.)

IIIb. Instrua provo, perfektiga kurso.

Innføring av relative bisetninger; særlig vises overgangen fra spørreord til relative pronomener.

## Norvega Kroniko

*La Esperantoklubo de Bergen*

aranĝis Finnlandan vesperon la 12an de marto, sub gvido de la prezidantino.

Kjell Offerdal parolis pri Finnlando, la topografio, vivo, moroj kaj lingvo.

Kaŭze de lingvmalfacilaĵoj la enloĝantoj havas limigitan eblecon kontakti la ceterajn skandinaviajn landojn. Li menciis la iniciativon de la turistorganizaĵoj por disvasti la Scion pri la lando.

Li priskribis la kongresan urbon Helsinko, kaj donis bonajn konsilojn al la vojaĝemaj geklubanoj. Post la prelego Aage Hennemann montris kolorfilmon pri Finnlando.

Offerdal ankaŭ prezentis finnan divenkonkurson.

Cisezone la klubo ankaŭ aranĝis laborkunvenojn, nome la 30an de januaro ĉe ges.oj Lilly kaj Trygve Davanger, kaj la 27an de februaro ĉe s.ino Annemor Jæger Bye. Tiam niaj labortaskoj estis laŭlegado, traduko, gramatiko kaj diskuto pri lingvaj problemoj.

Raportis *Kr. Svt.*

«MARA VENTO», Haugesund okazigis sian unuan kunvenon en la nova jaro la 30/1 kiel «finna vespero» kaj estis prezentataj plaĉkoloraj lumbildoj el diversaj partoj de la bela kaj vizitinda kongreslando. De la finna ambasado en Oslo estis pruntite ankaŭ alispeca materialo pri la kongres-urbo kaj la lando.

La programon konsistigis ankaŭ nombro da trafaj kaj belkoloraj lumbildoj pri Londono kaj Parizo.

Elektiĝis elekto-komitato por la jarkunveno kaj kaf-komitataninoj por la sekvaj klubkunvenoj.

Cetere oni, kiel kutime, kantis, kaj preparolataj estis la jarkunveno de NEL, la UK en Helsinko kaj eventuala distrikta renkontiĝo en Odda en la pentekosto.

«MARA VENTO», Haugesund, jarkunvenis la 27-an de februaro. La jar-raporto kaj jara bilanco rakontis pri relative aktiva agad-jaro.

La klubo regule kunvenadis kaj studrondo de daŭrigantoj studis por la ekzameno supera. Pluraj anoj partoprenis la distriktan jarkunvenon en Hogganvik kaj du Mara Vent-anoj ĉeestis la universalan kongreson en Madrido. Vizitis la klubon en 1968 la hinda s-ano Abani Halder kaj esp. ista familio el Praha. Programo estis — paroladoj kun filmoj kaj kolorlumbildoj, rakontadoj pri vojaĝoj ktp. — Programuloj estis klubanoj kaj gast-paroladantoj. Du klubanoj mortis post la antaŭa jarkunveno — Lauritz Oddenes kaj Ingvald Johannessen.

La elektoj rezultis jene: Prez. Klara Dahl, nova, vicprez. Erling Vorland, nova, sekr. O. J. Rønnevig, reelekto, kasisto Steffen Kjetland, reelekto, estrarano O. Thormodsen, reelekto. Anstataŭantoj: Solveig Mathiesen kaj Johannes Sortland. Revizoroj: Sigm. Blikshavn kaj Rolf Stenbro Jacobsen. Studgvidanto: Judith Johansen. Propagand- kaj inform-komitato: Sigv. S. Ege, Arne Gram kaj A. J. Smedsvik. Komisiulo de Esp. Forlaget: Steffen Kjetland. Gazetara kaj radia repr.: O. Thormodsen. Bibliotekisto: O. J. Rønnevig, nova. Raportisto al Norvega Esp-isto: la sekr.

S-ano Sigv. S. Ege proponis ke oni kontaktu junularklubojn por informi pri la lingvo kaj klopodi varbi interesatojn por Esperanto kaj la klubo.

Programulo de la vespero estis e-ano Ingvald P. Johnsen kiu vive kaj amuze rakontis pri kelksemajna libertempo sur la Kanariaj insuloj. Belaj kaj karakterizaj kolorlumbildoj akompanis la rakontadon. La ĉeestantoj dankis lin per meritita aplaŭdo.

*Rap.*

*Norda Stelo, Hamar*, kunvenis la 15an de januaro. Post bonvenigaj vortoj la prezidantino preparolis leteron de la pola radio kaj informis pri ties elsendoj. La orienta distrikto de NEL sendis inviton al kunveno en Nansenskolen, Lillehammer. Oni legis kaj tradukis el «La Mirinda Eleksiro».

Nova kunveno la 5an de februaro. S-ino Koller montris lumbildojn kaj rakontis pri sia restado ĉe Gardasjøen lastsomere.

Jarkunveno okazis la 26an de marto. Post legado de cirkuleroj ktp. oni pritraktis la jarraportojn de la sekretario kaj kasisto, ambaŭ aprobitaj sen rimarkigoj. La elektoj rezultis: Prezidantino Lise Koller (reel), vicprez. Per Engen (nova), sekr. Ragna Johannesen (reel), kas. Else Stang (reel), membro E. K. Ruud (reel). Anstataŭantoj Aslaug Diesen-Hoel kaj P. Myklevold (reel) kaj revizoro Julie Eggen.

*Sanda Esperantoklubb*

kunvenis 14an de februaro. La kunveno estis dediĉita al la «Semajno de internacia amikeco». Tri el la anoj rakontis, kiel oni povas amikiĝi pere de Esperanto.

Norman Birkeli korespondis kun Butler ekde 1949. La kaŭzo estis ilia denaska instruo de Esperanto al filino. Birkeli montris librojn, kiujn Butler verkis au eldonis.

Arthur Bjerke korespondis kun roterdamino Vermaas ek de 1938. Ilia unua renkontiĝo estis kiam la familio Vermaas venis al Bjerke por ferio 1965. Poste Bjerke vizitis ilin 1966 post la kongreso en Budapeŝto.

Olav Andersen komencis korespondi 1938 kun nederlanda 16-jarulino Betsy Wageneer. Post 20 jaroj ili renkontiĝis sur ŝipo inter Stavanger kaj Bergen, kaj poste ŝi vizitis la hejmon de Andersen 1963.

*Sauda Esperantoklubb*

kunvenis 14.III. La Prezidanto malfermis per deklamo de la poemo Revaĵo. Poste ni pritraktis leteron pri flugmaŝina vojaĝo al la Universala Kongreso. Sed ŝajne neniuj klubano partoprenis. Poste oni diskutis abonon de la bona revuo Norda Prismo.

Post bona regalo ni rigardis la esperantlingvan kolorfilmon pri Oslo, kiu estas bonega propagando per Esperanto por nia ĉefurbo. La elotitan libron gajnis N. Birkeli, kaj la gajnitan monon ni donas al la kontorfondaĵo.

Por prepari la aŭtunan laboron ni i.a. diskutis filmreklamon en la kinejoj. Nuntempe la prez. aranĝas kurson kun 6 infanoj el sia lerneja klaso. Laste s-ino Berge laŭtlegis leteron de sia plumamiki-  
no s-ino Holland en Usono.

A. Bj.

*Sauda Esperantoklubb*

kunvenis vendrede la 18 an de Aprilo en la hejmo de s-ino Veka. Ingrid Matland, kiu lastjare estis American Field Service stipendiato en Usono, montris belajn lumbildojn de sia jaro kun familio Morgan en Kansas City, kaj akompanis la bildojn per komentarioj en Esperanto.

Post kafopaŭzo kaj bona manĝaĵo, la prez. informis pri la aktualaj aranĝoj en la esperanta medio dum la proksimaj monatoj. La klubo decidis aĉeti la «Jamborean libron» por disdoni al la skoltoj en Sauda, konforme al admono en

la esperanta gazetaro. Oni ankaŭ decidis aboni al la nova altnivela gazeto «La monda lingva problemo.», 14 personoj ĉeestis.

ref.

*Klubo Esperantista en Oslo*

6/2.69. Per Johtan Krogstie el Løten rakontis pri la Kongreso de IFEF en Varna, Bulgarujo. Okazis diversaj aranĝoj, interalie tre bona teatra prezentado, bankedo, balo, pilkludo, ekskurso al la malnova urbo Nessebar ktp. La preleganto akompanis sian prelegon per multaj belaj kolorlumbildoj.

Per Johan Krogstie ankaŭ rakontis, ke fakterminaro por fervojoj baldaŭ estos preta. La Norvegaj Ŝtataj Fervojoj subvencias ĝin, kaj verŝajne ĝi estos havebla post kelkaj semajnoj.

Thor Magnus Carlsen per bela muntaĵo montris ke la Oslo gazetoj prezentis ne malmultajn artikolojn aŭ artikoletojn pri Esperanto dum januaro. Li ankaŭ montris 2 artikolojn pri Esperanto en la semajnaj ĵurnaloj «Allers» kaj «Hjemmet».

Raportis Harda Danielsen.

Raporto pri la klubkunveno en Klubo Esperantista en Oslo 17/2 1969.

Thor Magnus Carlsen kaj Otto Prytz prezentis tre amuzan numeron de la kluba gazeto «La Vagabondo», kaj krom tio aŭdigis sonbendigitan intervjuon, kiun faris Pola Radio kun nia klubano, Annalise Torgnes.

Okaze de la «Semajno de Internacia Amikeco» la ĉefa programo estis leterskribado al amikoj. Grupe oni sidigis ĉirkaŭ la tabloj, kaj finfine granda nombro da kartoĵoj estis pretaj kun koraj salutoj kaj multaj subskriboj. Ŝajnas ke tia programo, kiu aktivigas la klubanojn, kreas bonan atmosferon dum la kunveno kaj helpas al la membroj reciproke konatiĝi. Kiel kutime la ĉiam energia s-ino Ruth Herlofson sukcesis vendi multajn librojn.

Raportis Kirsten Ek.

*Klubo Esperantista en Oslo*

10/4.69. Randolph Grotmål prelegis pri «La laboro de la Sava Armeo». Ĝi fondiĝis antaŭ proks. 100 jaroj de William Booth kaj organiziĝis laŭ milita modelo kun titoloj kiel generalo, kapitano, enŝejo k.t.p. Kiel indikas la nomo, ĝi estas armeo, sed la celo de ĝia batalo estas por paco, socia plibonigo, kaj kiel kristana movado ĝi laboras por disvastigi la evangelion, precipe inter la malfeliĉuloj kaj bedaŭrinduloj. La Sava Armeo havas multajn help-instituciojn por infanoj, maljunuloj, senhejmuloj k.t.p. En Norvegujo la laboro de la Sava Armeo komencis en 1888. Randolph Grotmål ankaŭ montris serion da kolorlumbildoj, pri la diversaj flankoj de la aktiveco de la Sava Armeo, inklusive en Norvegujo. La prez. dankis al la preleganto por la tre interesa prelego, kaj la ĉeestantoj dankis per forta aplaŭdo.

Kirsten Gustavsen tre bone legis la novelon de J. H. Rosbach «La Mirinda Eleksiro» el la libro kun la sama titolo.

Raportis Harda Danielsen.

*Klubo Esperantista en Oslo*

Dum klubkunveno 6/3.69 okazis Ĝenerala Kunsido. La tuta estaro re-elektiĝis, nome: Prezidanto kaj studkvidanto: John Berggreen. Vicprezidanto kaj propagandestro: Thor Magnus Carlsen. Sekr.korespondanta: Kirsten Ek. Sekr.raportanta: Harda Danielsen. Kasisto: Aslaug Refsing. Estraranoj: Brynhild Østmo kaj Aase Gustavsen. Anstataŭantoj: Eva Støp-Bowitz kaj Birgit Normann.

Raportis Harda Danielsen.

La Urso, Sarpsborg, regule kunvenadas ĉiun duan ĵaŭdon. Bedaŭrinde ĉiuj junulaj membroj post la studenta ekzameno forlasis la urbon, kiel ke nur la malnova kerno laboras. La plej nova programero estas konkurso bazita sur poŝtmarkoj. Tiu konkurso havigas monon por la kaso-poŝtmarkojn en la kluban albumon kaj kreas horon de amuzo por la anoj.

*Ekspozicio de Esperanta literaturo.*

La Urba Biblioteko de Sarpsborg, kiu nun posedas belan kolekton da Esperantaj libroj, aranĝis ekspozicion de Esperanta literaturo. La ekspozicio ĝin nun daŭris du monatojn.

## Jubileoj

### Nia Dujeno

Pensiulo Tharald Andreas Dybing ne estas la plej maljuna esperantisto nunvivanta en Norvegujo, sed li estas la plej maljuna *aktiva* esperantisto en nia lando. Tial oni rajtas nomi lin nia Dojeno.

Li naskiĝis la 16an de aprilo 1884 en Kristiansand. Dum kelktaga restado en Kristiano li hazarde rimarkis gazetononcon pri prelego pri Esperanto okazanta la 11an de oktobro 1906. La prelegon faris stud.filol. Emil Smith, kaj de kiam Dybing forlasis la kunvenon, li estis konvinkita esperantisto. Jam en decembro 1906 li provis fondi esperantoklubon en Bakke apud Flekkefjord, sed ĉar ne estis eble havigi lernolibrojn, tiu unua provo malsukcesis. En 1907 li translokiĝis al Stavanger, kaj tie li havigis al si la lernolibron de Thomsen, «Smaa Timer i Esperanto», kaj komencis la studon de la lingvo.

En 1922 li gvidis kurson en Stavanger kaj fondis la klubon «La Tagiĝo» kun 9 membroj, kaj li fariĝis ĝia unua prezidanto. En tiuj jaroj li multe propagandis en la gazetoj kaj i.a. ellaboris gazetkurson de Esperanto en «Fritt Slag». En 1923 li ankaŭ redaktis propran Esperanto-gazeton, kiu bedaŭrinde aperis nur unu fojon.

Dybing estis prezidanto de Orienta Distrikto de NEL 1958—60, kaj dum multaj jaroj li estis eks-

pedisto de Norvega Esperantisto.

En 1959 li fariĝis Kavaliro de la 2a klaso kaj en 1967 Kavaliro de la 1a klaso de PRO MERITO.

Ni postfeste sendas al la jubileulo niajn plej korajn kaj sincere rajn salutojn!

LKH

Meblotapetisto Enevald Mārli, Bodø, fariĝis 70-jara la 16an de aprilo. Li esperantistiĝis ĉ. 1936 kaj fariĝis vicprez. de Bodø Esperantoklubo 1942—45 kaj prez. 1946—55 kaj 1964—. Li ankaŭ estis prez. de Nordlanda Distrikto de NEL 1954—67 kaj kasisto 1968—. Mārli estis Vicdel. de UEA por Bodø 1951—66 kaj Del. 1966—.

En 1956 li fariĝis Kavaliro de la 2a klaso de PRO MERITO.

Postfeste ni kore gratulas kaj salutas!

LKH

La fidela kaj fervora veteranino en Sauda, s-ino Karen Berge, fariĝis 80-jara la 15an de majo. Ŝi esperantistiĝis en 1937 pere de kurso de O.T. Nicolaisen en Sauda, kaj tuj membriĝis al Sauda Esperantoklubb, kiu fondiĝis post tiu kurso. Dum kelkaj jaroj ŝi ankaŭ estis vicprez. de la klubo.

Ŝi ankaŭ estis Del. de UEA por Sauda 1955—65.

Postfeste ni sendas niajn plej korajn dankojn kaj deziras al ŝi feliĉon kaj sanon dum la jaroj venontaj!

LKH

Sukeraĵisto Saxer J. Ebeltoft, Tromsø, fariĝis 75-jara la 26an de junio. Li naskiĝis en Harstad kaj esperantistiĝis en 1935 de kurso de O. T. Nicolaisen en Harstad. Post la kurso Ebeltoft estis unu el la kunfondintoj de la klubo «Noktomeza Suno», kaj li fariĝis ĝia vicprez. 1935—38, ĝia kas. 1939—. Post la milito Ebeltoft estis prez. de la klubo de 1947 ĝis li en 1949 translokiĝis al Tromsø. Tie li fariĝis prez. de la klubo «La Norda Lumo» en 1954. La saman jaron li ankaŭ fariĝis Kavaliro de la klubo ordeno «La Verda Kato».

Ebeltoft gvidis plurajn kursojn kaj studrondojn, kaj estis Del. de IEL por Harstad 1939—49 kaj Vicdel. de UEA por Tromsø 1954—65.

Niajn plej korajn gratulojn kaj bondezirojn al la jubileulo!

LKH

La ĉiam energia kaj agema esperantisto, inĝeniero Nils Johan Matland, Sauda, fariĝis 50-jara la 5an de aŭgusto. Li esperantistiĝis en 1937 pere de kurso de O. T. Nicolaisen en Sauda. Li tuj elektiĝis loka propagandaestro de la nova klubo, kiu fondiĝis post la kurso. Tiun oficon li okupis tute ĝis 1943 kiam li translokiĝis al Bergen por tie viziti la teknikan lernejon. Li ankaŭ estis sekretario de Sauda Esperantoklubb 1941—43.

En Bergen li tuj fariĝis membro de la klubo tie, kaj en 1947—53 kaj 1957—59 li estis ĝia prezidanto. En Bergen li ankaŭ trovis sian edzinon, Elna Rekve.

En 1947 Matland elektiĝis propagandestro de NEL, kaj en tiu ofico li faris grandan laboron. Matland i.a. estis gvidanto de la int. esperantistaj feriosemajnoj en Lofthus 1947—54, li tradukis amerikan propagandbroŝuron, pri-laboris la planojn pri norveglingva propagandgazeto kaj iniciatis kaj desegnis la memorŝtonon pri Haldor Midthus. Li estis ankaŭ prez. de Okcidenta Distrikto de NEL 1949—50, 1953—54 kaj 1966—67.

Matland gvidis multajn kursojn kaj studrondojn, kaj dum restado en Mo i Rana la vintron 1953—54 li gvidis kurson tie, kaj post tiu kurso fondiĝis La Esperantoklubo de Mo en 1954. Bedaŭrinde tiu klubo malfondiĝis en 1969.

En 1960 Matland translokiĝis reen al Sauda, kaj de 1966 li estis prezidanto de la klubo tie. En 1967 lia klubo i.a. aranĝis la 40an Norvegan Esperanto-Kongreson. En 1957—61 Matland estis konsilantaroano de NEL, kaj de 1962 li estis membro de la Financa Komisiono de NEL.

Dum liberaj horoj Matland tre ŝatas traduki en Esperanton, kaj al multaj el niaj belaj norvegaj poemoj kaj kantoj li donis Esperantan veston.

Matland estis ankaŭ Fakdel. de UEA kaj por Bergen kaj Sauda dum multaj jaroj.

En 1951 li fariĝis Kavaliro de la 1a klaso de PRO MERITO.

Korajn gratulojn kaj sincerajn bondezirojn al nia energia samideano!

LKH

## ESPERANTO-JUNULARO: RACIAJ INTERNACIISTOJ

«Reciprokaĵoj kompreno kaj respekto nepras por kreado de paca mondo.» Per tiaj grandeprimaj vortoj, Konferenco de Unesko pri la Junularo antaŭ kelkaj jaroj pri-traktis la internacian komprenon. «Hodiaŭ,» deklaris ĝia raporto, «la internacia vivo okupas ĉiam pli-grandiĝantan lokon en la atento de la tuta junularo.» Tiajn kontaktojn inter gejunuloj «malhelpas lingvaj diferencoj.»

Tiuj, kiuj multe vojaĝis en aliaj landoj, aŭ multe kontaktis kun alilandanoj, scias, ke la vortoj de la Unesko-konferenco estas konsternaj veraj. Vole-nevole, la nacioj estas hodiaŭ puŝataj al ĉiam kreskanta interkontaktado. Precipe la junularo tion spertas. La specialistoj atentigas nin, ke la batalo kontraŭ malriĉo, analfabetismo kaj malsano estas internacia batalo, en kiu nepras la harmonia kunlaboro de la nacioj.

Sed plej baza ilo de kunlaboro — la lingvo — mankas. Ni estas firme limigitaj al la propraj lingvogrupoj, mutaj antaŭ alilingvanoj. La gejunuloj en la Unesko-konferenco (kaj iliaj reprezentantoj) rekonis la sensencan perdon de energio pro lingvaj diferencoj, sed ne povis trovi bonan solvon. Ili rekomendis lingvolernadon, terminarojn, tradukadon — iom primitivaj kaj multekostaj rimedoj.

Sed unu grupo de gejunuloj solvis la problemon laŭ maniero racia

kaj inteligenta. Tiu grupo estas la Esperanto-parolanta junularo.

En 1964, kiam okazis tiu konferenco en Grenoble, malmultaj gejunuloj en internaciaj medioj sciis pri la ekzisto de la internacia lingvo Esperanto. La esperantistoj ne estis invititaj partopreni la konferencon, kaj Esperanto ne leviĝis en la diskutoj. Hodiaŭ, tamen, tiu situacio ŝanĝiĝis. Verŝajne la plimulto de junaj funkciuloj en internaciaj organizoj, eĉ se ili ne intime konas Esperanton, scias pri kio temas. Kaj ili ofte estas tre favoraj al la ideo de internacia lingvo kiel solvo de la monda lingvo-problemo. Parolantoj en internaciaj junularaj konferencoj ofte mencias la lingvon; aludoj al ĝi aperas en la junulara gazetaro.

Al kiu atribui tiun rimarkindan ŝanĝon? Precipe al Tutmonda Esperantista Junulara Organizo. TEJO estas la ĉefa internacia organizo por junaj parolantoj de Esperanto, kun 23 landaj sekcioj kaj ĉirkaŭ 10 000 membroj. En la lastaj jaroj ĝi kreskis ĝis tiu statuso, post jaroj kiel malgranda klubeca organizo. La kresko ĉefe rezultis el saĝa gvidado kaj efika kanalo de la junularaj idealoj. Tio respeguliĝas ekzemple en la eldonaĵoj de TEJO. Ĝi aperigas novaĵbultenojn en tri lingvoj (angla, franca, Esperanto). Ili estas distribuataj ankaŭ al junaj funkciuloj en internaciaj organizoj. Ĝi ankaŭ eldonas lukse ilustritan revuon, «Kontakto». Ĉar TEJO-anoj ne estas sektecaj lingvoamantoj, sed energiaj mondĉivitanoj, ili

dediĉas sian revuon ĝuste al mondaj problemoj — tiuj pri kiuj avertas nin la jam menciitaj specialistoj. TEJO-anoj dialogas pri tiuj problemoj trans la landlimoj. Ili praktikas internaciismon en la propra agado, per internacia vizit-interŝanĝo, renkontiĝoj, agado inter skoltaj kaj studentaj, ktp. Dank' al la saĝa kaj klarvida agado de TEJO-anoj, la vortoj TEJO kaj Esperanto estas hodiaŭ respektataj terminoj en internaciaj junularaj konferencoj. Tie ankaŭ delegitoj de TEJO regule partoprenas.

Rilatoj kun aliaj junularaj organizoj estas nur unu faceto de la agado de TEJO. Por ĝin subteni, aliĝu al TEJO kiel Patrona Membro, aŭ, se vi estas malpli ol 26-jara, kiel individua membro. Skribu por informoj al: TEJO, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam 2 - Nederlando. H. T.

### LA RADIO KAJ NI

En februaro la svisa radio esperantlingve disaŭdigis interesan statistikon. Ĝi ricevas ĉiujare preskaŭ 20 000 leterojn el eksterlando. El ili 8000 venas el Ameriko, 9500 el Eŭropo kaj 2500 el aliaj kontinentoj. 12 000 leteroj estas skribitaj en la angla, 3500 en la germana, 1200 en la portugala, 920 en la hispana, 760 en la franca, 720 en la itala, 360 en la araba, kaj — 130 en E-o! Tio donas tre trafan impreson pri la situacio. Memoru, ke la radiostacioj ne ekhavas impreson pri la akcepto de la disaŭdigoj, se ili ne ricevas leterojn de la aŭskultantoj, sed kompreneble konkludas, ke ne

havas sencon disaŭdigadi la koncertajn programojn. Do, se iu radiostacio ĉesigas siajn esperantlingvajn elsendojn, la kulpo estas nur *nia*, kaj ni ĉiam havas tiom da esperantaj radioprogramoj, kiom ni meritas. La veron de tio pruvas la fakto, ke ekde 1965 la svisa radio ĉesigis siajn elsendojn en E-o, sed en novembro samjare ĝi rekomencis ilin, ĉar relative multaj E-istoj skribis al la radio, bedaŭrante la ĉesigon. Pruvon mi ankaŭ vidas en la fakto, ke la pola radio ekde pasinta oktobro triobligis siajn elsendojn en E-o.

La svisa statistiko fakte ne surprizis min, ĉar tiu radiostacio elsendas nur mallongdaŭrajn programojn en E-o, kaj al malmulto oni kompreneble ne povas komentarii multe. Veran surprizon mi aŭdis el Radio Budapeŝto, kiu dum tri jaroj elsendadis en E-o ĉiutage. Ekde la unua de marto ĉi-jare tiuj disaŭdigoj ĉesas «pro teknikaj kaŭzoj», aŭ laŭ mia interpreto, pro manko de leteroj de la aŭskultantoj. Ni ĉiuj certe ĝojis, kiam ni eksciis, ke la hungara radio, kiel la dua en la mondo, enkondukis ĉiutagajn elsendojn en la Internacia Lingvo, kaj pro la sukceso de la E-a redakcio de Radio Varsovio ni ne imagis, ke la alia stacio, kiu ĉiutage elsendis en E-o, ĉesigos tiujn programojn. Mi mem skribis bedaŭran leteron al Radio Budapeŝto, kaj mi petas ĉiujn legantojn de Norvega Esperantisto fari same! Sufiĉe multe da tiaj leteroj eble kaŭzos rekomencan de la E-lingvaj programoj.

La revuo Esperanto en la unua monato de ĉiu jarkvarono aperigas tabelon pri la radioelsendoj en E-o. Rigardu ĝin, provu kapti la programojn, kaj aŭskultinte ilin, skribu al la koncernaj radiostacioj pri la aŭdebleco, pri la enhavo de la programo kaj pri viaj ideoj plibonigi la disaŭdigojn!

Otto Prytz.

### Merituljo forpasis †

La 8an de Majo en sia 75 jara datreveno Johannes Jahren neatendite mortis. Li estis unu el la fondintoj de la Esperantoklubo de Bergen kaj estis plurfoje ĝia prezidanto, kaj cetere havis ĉiujn postenojn en la estraro. Kiel multjara delegito de UEA li servis gesamideanojn en la tuta mondo kaj la hejmo de Jenny kaj Johs. estis dum jardekoj la natura centro de la esperantomovado de Bergen kie ni ofte kunvenis, festis kaj akceptis gastojn de la cetera mondo, kaj «la Esperantomuro» en lia salono raportas pri varia agado por nia afero. Per sia entrepreno «POESI» li havis kontakton kun homoj antaŭ ĉiaj celebroy kaj la kvalito de liaj produktaĵoj estis vere alta. En la klubjurnalo li verkis artikolojn kaj originalajn poemojn kaj eĉ komponis melodion por nia kluba kanto.

Johannes Jahren estis dum multaj jaroj loka estro de la ekzamena komisiono kaj havis la ordenon de merito krom la kluba ordeno. Ne nur bergenanoj, sed gesamideanoj en la tuta mondo sentas la mankon de li.

Kjell Offerdal.

La 13an de Marto forpasis en Hamar Gustav Johannessen en la aĝo 86 jaroj. — Kiam Ottmar Fischer ekde 1931 gvidis sciajn grandajn kursojn. i.a. en Hamar, lia eble plej fervora kursano estis Gustav Johannessen. Je la demando «Kio vi estas?» venis la respondo «Mi estas masonisto», kaj la postaj generacioj konis lin precipe nur kiel «La Masonisto». Dum la glora antaŭmilita «Hamar-epoko» li estis gvida persono de la loka klubo, sed paralele li ankaŭ modele gvidis la «Librofakon» de N.E.L. (kiu poste fariĝis Eldonejo Esperanto aŭ Esperantoforlaget) kaj faris el ĝi prosperan librokomercejon. Klasika estis lia repliko, kiam aperis iu naŭva propono: «Ni ne ludas butikon en Hamar!» — Dum la milito La Masonisto suferis gravan akcidenton, kiu rompintis lian sanon kaj iom post iom faris lin preskaŭ tute blinda. Tamen li multe kontribuis al la konservado kaj revigligo de sia kara klubo «La Norda Stelo» ankaŭ dum tiuj jaroj, kion rekonis la klubo, nomante lin honora membro, kaj N.E.L., donante al li la ordenon PRO MERITO. — Tre multaj gesamideanoj norvegaj kaj alilandaj ankaŭ kun dankemo kaj ĝojo rememoras gajajn tagojn pasigitajn en la somera kabano de la Masonisto, «La Dometo» en Furnesåsen. — Dankante pro lia senlaca sindediĉo al la Esperantomovado ni deziras pacon al lia memoro.

C. Støp-Bowitz.

## ADOPTA PLANO de S.E.L.

La estraro de N.E.L. sendis al la kluboj cirkuleron pri la adopta plano de la Skolta Esperantista Ligo (SEL), kaj ni per tio ci ankau admonas la rektajn membrojn partopreni en la agado. La plano estas:

Kluboj kaj unuopuloj adoptu skoltan trupon.

La adoptanto donacu al la trupo ekzempleron de la nova lernolibro por skoltoj «La Jamborea Lingvo».

La adoptanto helpu al speciala kurso ek de autuno 1969 kun speciala rigardo al la monda Jamboreo en Japanujo 1971.

Ei tiu laboro oni intime kunlaboru kun NEL (la ĝenerala sekretario estas multjara skoltgvidanto) kaj SEL kies norvega repr. estas H. A. Rosbach.

Ni substrekas, ke la Skolta Monda Oficejo nun estas tre pozitiva, kaj ke la plej superaj skoltestroj ricevos la libron dum la Mondkonferenco en Helsinko septembro 1969. Norvegaj skoltoj povas uzi sian scion por la doganista au la esperantista insignoj.

La Monda Oficejo nun — post la jamboreo en Essex, kie esperanto estis oficiala lingvo — pritraktas la permeson au devigon de esperanto kiel oficiala lingvo dum la jamboreo en Tokio.

La libro estas mendebla ĉe NEL kaj kostos 5 kr.

## LA KONGRESO

Al la kongreso en Helsinki sin anoncis 1530 personoj el 35 landoj, kaj tio estas 200 pli ol je la sama dato por Madrid. El tiuj estas 27 norvegoj. Plej multaj venas el Finnlando (315), Svedujo (197), Francujo (120), Nederlando (110) kaj Britujo (92).

Dum la kongreso okazos «La unua Interreligia Kunveno Esperantista» lau iniciato de la prezidanto de KELI, pastro A. Burkhardt, kaj sub organizo de la Oomoto-movado.

Dum la kongreso ankaŭ okazos la tria Lerneja Konferenco, sub patroneco de la Ministro de Instruado de Finnlando, d-ro J. Viro-lainen. En la Internacia Somera Universitato prelegos 9 profesorojn kaj aliajn altkvalifikitajn personojn.

La estraro de UEA decidis, ke la kongreso 1970 okazu en Vieno, kaj oni jam nun povas peti alsendon de la Unua Bulteno. La kongreso okazos sub la alta protektado de Franz Jonas, la Prezidanto de Aŭstrujo. La loka kongresa komitato, sub prezido de Ludwig Jonas, jam vigle eklaboras.

Ŝajnas ke multaj ĉeestantoj en la Universalaj Kongresoj ne atentis ke la Komitatkunsidoj de U.E.A. estas publikaj, tiel ke kiu ajn kongresano rajtas ĉeesti ilin. La Liga Estraro rekomendas ke ĉiu, kiu interesiĝas pri la laboroj kaj la gvidado de nia monda organizaĵo, vizitu la komitatkunsidojn por informiĝi pri tio, kiel nia movado estas gvidata.



## Korespondu!

15-jara gimnazia lernantino serĉas gelernantojn, kiu ŝatus korespondi pri sporto kaj dancmuziko. Mi kolektas poŝtmarkojn kaj poŝtkartojn. Aniko Pittner, Eötvös str. 53, *Budapest XII*, Hungarujo.

Fervojisto-filatelisto deziras korespondi kaj interŝanĝi poŝtmarkojn. Josef Lanar, Sokolská 18, *Praha — II*, Ĉeĥoslovakujo.

Bildkartvesperon ni organizos komence de julio 1969. Bildkartrespondo estas garantiita. Nova Vojo, REMETEA, Dep. Harghita, Romanio.

### La kontorfondaĵo

Pli frue .....	kr. 654,00
Ascendo, Halden ....	» 10,00
O. Rygg .....	» 100,00
H. Danielsen .....	» 220,00
C.S.B. ....	» 10,00
	-----
	kr. 994,00

Koran dankon al ĉiuj donacintoj!

### Ĉu vi plendis?

Kelkaj abonantoj informis ke ili ne ricevis n.ron 3/69 de Norvega Esperantisto. Ĉar eble okazis ia eraro ĉe la poŝto aŭ ĉe la ekspedejo, ni petas ĉiujn, kiuj ne ricevis tiun (aŭ alian) numeron, tuj informi nin. Ni tuj sendos la mankantajn numerojn.

*La ekspedejo.*

## RECENZOJ

Vilho Setälä: Esperanton  
kieli-oppi. Ovo-serio1.  
Fondumo Esperanto,  
Helsinki 1969.

Antaŭ la kongreso en Helsinki venas tiu malgranda finn-lingva esperanto-gramatiko. La nomo de la verkisto garantias la enhavon, kaj jen ĉio, kion povas diri norvego pri tiu libro kun tiel fremda lingvo.

R.

### NORSK ESPERANTO-FORBUND

*(Norvega Esperantista Ligo)*

Postadrese: Boks 942, Oslo. Postgiro 100.30  
Kontoradrese: St. Olavsgate 27 III, Oslo  
Telefon: 20 20 83  
Kontortid: Tirsdag og fredag 15.30-16.30

*Turisma Servo:* Boks 942, Oslo.  
Postgiro 100.32

### ESPERANTOFORLAGET A/S

*(Eldonejo Esperanto A/S)*

Postadrese: Boks 942, Oslo. Postgiro 100.31  
Kontoradrese: St. Olavsgate 27 III, Oslo  
Telefon: 20 20 83

### Ĉefdelegito de U.E.A.:

S-ro Alfred Skyberg, Østensjøvn. 118 a,  
Oslo 6. Postgiro 133.29

### La redakcio:

Privata adreso de la ĉefredaktoro:  
Johan Hammond Rosbach,  
Hulderveien 17 B, N-1700 Sarpsborg. —  
Uzu tiun adreson, kiam temas pri urĝaj  
sendaĵoj. — Telefono: 54 727

Trykk: A. Sæther A.s - Hamar